# esperanto aktuala

Revuo de la Esperantista Brusela Grupo Numero 2 / 2013



## Unuiĝintaj koloroj de Esperanto

# PRINTEMPAS

en Greziljono

gresillon.org/printempas



Intensivaj kursoj kun Christophe Chazarein kaj Stefan MacGill

Internaciaj KER-ekzamenoj (B1, B2, C1)

Seminario pri interkultura komunikado kun Radojica Petrović


**20-a ĝis 27-a de Aprilo kaj 27-a de Aprilo ĝis 1-a de Majo**





# K O L O F O N O

38a ELDONJARO. **Redaktoroj** : Laurent kaj Samy Loisse : aktuala@esperantobruselo.org ;
Fondita en 1976, de Léo De Bruyne, informilo kaj oficiala organo de Esperantista Brusela Grupo, societo centjara neprofitcela fondita je la 10a de Februaro 1907, registrita en la belga ŝtata oficiala ĵurnalo «Belgisch Staatsblad, Moniteur Belge» kun la n° 0419498274, honorigita kiel reĝa societo ek de la 29a de Majo 1957. **Aktuala estas libere elŝutebla tie** : https://sites.google.com/site/ebgaktuala/
**Prezidanto** : Angelos Tsirimokos prezidanto@esperantobruselo.org ; **Kasisto** : Jan Amadori jan.amadori@gmail.com
**Sekretario** : Laurent Loisse sekretario@esperantobruselo.org , **Informoj / kursoj :** Françoise Pellegrin fransuaz@esperantobruselo.org
**Eventoj :** JM Nicolas de Buyl nikolao@esperantobruselo.org **Retejo de EBG : www.esperantobruselo.org**
**Abona membriĝo** : 10 aŭ 13 eŭroj jare, konto : **IBAN** : BE87 5230 8055 0794, **BIC** : TRIOBEBB de la Esperantista Brusela Grupo
**Kunvenejo** : rue Van Maerlant 2, 1000 Bruselo Metroo Maelbeek ĉiumerkrede 18h30-20h00 - Tie nek poŝtkesto, nek telefono .
Vidpunktoj de artikoloj en Aktuala ne nepre spegulas opiniojn de la ĉefa redaktoro aŭ de EBG - Esperantista Brusela Grupo



# A G E N D O

*Bonvolu kontroli la ĝisdatigojn sur nia nova retejo : www.esperantobruselo.org*

**Kursoj kaj kunveno okazas ĉiumerkrede** en nia kunvenejo en la konstruaĵo de la Eŭropa Komisiono, Rue Van Maerlantstraat 2, 1000 Bruselo. **Ne kursoj la 3/04, 10/04 kaj la 1/05/2013.**
Novuloj, bonvolu sin anonci al fransuaz@esperantobruselo.org aŭ telefone +32 2 358 27 28

## MARTO

| | | |
|---|---|---|
| **Sabato la 2a** | **14:00 - 16:00** | **Konversaciorondo en Dilbeek** (ℹ Lydia: 054/330.151)<br>Kulturcentro «Westrand» - Kamerijklaan, 1700 Dilbeek |
| **Vendredo la 8a,<br>sabato la 9a &<br>dimanĉo10a** | **09:30 - 22:00<br>09:30 - 20:00<br>10:00 - 13:00** | **Studsemajnfino kun Katalin KOVÀTS (Antverpeno)**<br>Pri KER-ekzameno, RETE & LERTE, kaj poste prelego pri Hungario kaj dimanĉon promenado kun Ella STRUG<br>**http://www.ipernity.com/blog/flandra_esperanto-ligo/448136** |
| **Sabato la 23a** | **13:30 - 17:00** | **Ĝenerala Kunveno BEF** ĉe Taverno Le Breughel<br>Placo Cardinal Mercier 23 en 1090 Jette (Bruselo) |
| **Dimanĉo la 24a** | **12:30<br>aŭ<br>13:00** | **Vizito de la ateliero ceramika de Claire CHUET**<br>Nepra aliĝo ĉe (ℹ mlaitat@yahoo.fr ) aŭ 0486 96 92 14<br>Nur 2 grupoj de 8 personoj - Specifu la horon 12:30 aŭ 13:00 |

## APRILO

| | | |
|---|---|---|
| **Sabato la 6a** | **13:00 - 22:00** | **Eskapadoj en Bruselo : Serĉpromenado**<br>Nepra aliĝo ĉe (ℹ mlaitat@yahoo.fr ) aŭ 0486/96 92 14 |
| | **14:00 - 16:00** | **Konversaciorondo en Dilbeek** (ℹ Lydia: 054/330.151)<br>Kulturcentro «Westrand» - Kamerijklaan, 1700 Dilbeek |
| **Merkredo la 27a** | **10:00 - 17:00** | **38-a Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA.**<br>Roterdamo (NL) |

## MAJO

| | | |
|---|---|---|
| **Merkredo la 1a** | **13:30 - 18:00** | **Vizito de Apoteka Ĝardeno en Lessines**<br>ℹ Monique VAN ROY (068/54 27 28) prefere frumatene aŭ Catherine ROYAUX (010/45 19 21) - cat.royaux@netcourrier.com |
| **Vendredo la 17a ĝ.<br>dimanĉo la 19a** | **17:00-<br>14:00** | **PEKO 2 en Wépion (BE)** Centro La Marlagne.<br>ℹ www.esperanto-wallonie.be aŭ +32 485 517 552 (ĉe Valère) |



**Saluton Kara Legantaro !**

«***Esperanto: la lingvo de la printempo en la mondo***». Tio estos la titolo de prelego kiu okazos en la araba lingvo dum la venonta **Monda Socia Forumo** en Tunizio (en la ĉefurbo Tuniso ĉe la universitato «El Manar»). Kompreneble, la titolo memorigas la «*Araban Printempon*» kiu skuis la mondon ekde Decembro 2010 ĝis 2012 per ondoj da popolaj ribeliĝoj en kelkaj arabaj landoj el kiuj -precize- Tunizio.
La esperantistaj partoprenantoj estas pretigantaj materialon en pluraj lingvoj por prezenti kaj disdoni ĉe la budo.
Oni havas la eblecon subteni ilin per la kutima konto de UEA (facile trovebla ĉe http://www.uea.org/), menciante «por Tunizio».
La forumo komencos la 26an de Marto kaj finiĝos la 30an de Marto.
For la vintro ! La Printempo baldaŭas !

Laur' kaj Samy
aktuala@esperantobruselo.org

## Enhavo

Paĝo 3 : Printempas en Greziljono
Paĝo 4 : Eventoj
Paĝo 5 - 7 : Ĉarto de principoj de M.S.F.
Paĝo 8 : Esperanta skrablo
Paĝo 9 - 10 : Vojaĝo per biciklo
Paĝo 11 - 12 : Revenante de Fukuŝimo
Paĝo 13 - 14 : NR
Paĝo 15 : Skandalo pri la ĉevala viando
Paĝô 16 : Lituania invito
Paĝo 17 - 19 : I-F en Dortmund
Paĝo 20 : Reklamo FESTO

# Ĉarto de principoj de MONDA SOCIA FORUMO

La Komitato de brazilaj instancoj konceptinta kaj stariginta la unuan Mondan Socian Forumon, okazintan en Portoalegro de la 25a ĝis la 30a de januaro 2001, post taksado de la rezultoj de tiu Forumo kaj la esperoj kiujn ĝi naskis, juĝis necese kaj legitime starigi Ĉarton de Principoj celantan orienti la daŭrigon de tiu iniciato. La Principoj enhavataj en la Ĉarto – respektendaj de ĉiuj kiuj dezirus partopreni en tiu procezo kaj de ĉiuj anoj de la organizantoj de novaj eldonoj de Monda Socia Forumo– solidigas la decidojn aŭspiciintajn la realigadon de la Portoalegra Forumo, sukcesigintajn ĝin, kaj plifortigintajn ĝian amplekson, fiksante orientiĝojn devenantajn de la logiko de tiuj decidoj.



1. La Monda Socia Forumo estas malferma renkontiĝejo celanta la pliprofundigon de la pripensado, la demokratian idedebaton, la formuladon de proponoj, la tutliberan interŝanĝon de spertoj, kaj la artikiĝon de efikaj agadoj, fare de la instancoj kaj la movadoj de civila socio kontraŭstarantaj la novliberalismon kaj la mondsuperregon fare de Kapitalo kaj de ĉia imperiismo, kaj klopodantaj konstrui planedan socion bazitan sur fekunda rilato inter homoj kaj de tiuj ĉi kun la Tero.

2. La Portoalegra Monda Socia Forumo estis aranĝo tempe kaj space lokita. De nun, sin bazante en la certo proklamita en Portoalegro ke "alia mondo eblas", ĝi iĝis konstanta procezo de serĉado kaj ellaborado de alternativoj, ne reduktebla al la eventoj sur kiuj ĝi sin apogas.

3. La Monda Socia Forumo estas mondskala procezo. Ĉiuj renkontiĝoj apartenontaj al tiu procezo havu internacian dimension.

4. La alternativoj proponitaj en la Monda Socia Forumo kontraŭstaras la procezon de kapitalisma tutmondiĝo gvidata de grandaj transnaciaj entreprenoj kaj de registaroj kaj internaciaj institucioj servantaj al iliaj interesoj, kun la kompliceco de la naciaj registaroj. Tiuj alternativoj celas, kiel novan etapon de monda Historio, firmigi solidaran tutmondiĝon respektantan la universalajn homajn rajtojn, ĉiujn de ĉiuj nacioj, kajla medion; sin apogante sur internaciaj demokratiaj sistemoj kaj institucioj servantaj al la sociala justeco, la egaleco kaj la suvereneco de la popoloj.

5. La Monda Socia Forumo arigas kaj kunordigas nur instancojn kaj movadojn de la civila socio de ĉiuj landoj de la mondo, sed ĝi ne pretendas esti instanco reprezentanta la mondan civilan socion.




6. La renkontiĝoj de la Monda Socia Forumo ne havas decidan karakteron. Neniu do estas permesata esprimi nome de la Forumo, en iu ajn evento, pozicion pretendantan esti tiu de ĉiuj partoprenantoj. La partoprenantoj ne devas esti alvokataj preni decidojn, voĉdone aŭ aklame, kiel ariĝo de ĉiuj partoprenantaj en la Forumo, pri deklaroj aŭ agadproponoj engaĝigantaj ilin ĉiujn aŭ plimulton da ili kaj pretendantaj esti decidoj de la Forumo kiel tia. Ĝi ne konsistigas do povinstancon disputeblan inter la partoprenantoj en tiuj renkontiĝoj, nek pretendas konsistigi la ununuran alternativon pri kunordigo kaj agado de la instancoj kaj movadoj kiuj en ĝi partoprenas.

7. La instancoj –aŭ instancaroj– partoprenantaj en renkontiĝoj de la Forumo devas do certi ke ili povas libere debati dum ili pri deklaroj kaj agadoj kiujn ili decidis starigi, sole aŭ kunordige kun aliaj partoprenantoj. La Monda Socia Forumo engaĝiĝas amplekse en la disvastigo de tiuj decidoj per siaj eblaj rimedoj, ne trudante orientiĝojn, hierarkiojn, cenzurojn kaj limigojn, sed kiel decidoj de la instancoj aŭ instancaroj mem.

8. La Monda Socia Forumo estas plurisma kaj diversigita, nekonfesia, neregistara kaj nepartia spaco, kiu malcentrige kaj rete kunordigas instancojn kaj movadojn engaĝitajn en konkretaj agadoj, loke aŭ internaciskale, celantaj konstrui alian mondon.

9. La Monda Socia Forumo ĉiam estos spaco malferma al plurismo kaj diverseco de engaĝoj kaj agadoj de instancoj kaj movadoj decidantaj partopreni ĝin, samkiel al plureco seksa, etna, kultura, generacia kaj de fizikaj kapabloj, tiomgrade, kiom respektiĝas la Ĉarto de Principoj. Ne rajtos partopreni en la Forumo, kiel tiaj, reprezentaro de partioj, nek militaj organizaĵoj. Regantoj kaj parlamentanoj alprenantaj la engaĝojn de la nuna Ĉarto povas esti invitataj partopreni kiel privatuloj.

10. La Monda Socia Forumo kontraŭstaras ĉian totalisman kaj reduktigan vidon pri ekonomio, disvolviĝo kaj historio, kaj la uzon de perforto kiel rimedo de socia kontrolo de la Ŝtato. Ĝi kontraŭmetas la respekton al Homrajtoj, veran partoprenigan demokratian praktikon, egalistajn, solidarajn kaj pacemajn rilatojn inter la homoj, etnoj, seksoj kaj popoloj, kaj ĝi kondamnas ĉiajn superregojn kiel submeton de unu homo al alia.



11. La Monda Socia Forumo, kiel debatejo, estas idemovado stimulanta la pripensadon, kaj la travideblan disvastigon de la fruktoj de tiu pripensado, pri la mekanismoj kaj iloj de kapitala superrego, pri rezistadaj rimedoj kaj agadoj kaj maniero transpasi tiun superregon, pri proponitaj alternativoj por solvi la problemojn de ekskludo kaj socia malegaleco kiujn la procezo de kapitalisma tutmondiĝo, kun siaj rasismaj, seksismaj kaj medidetruaj elementoj, kreas internacie kaj ene de ĉiu lando.



12. La Monda Socia Forumo, kiel medio de interŝanĝo de spertoj, stimulas la reciprokan konon kaj la agnoskon de partoprenantaj instancoj kaj movadoj, valorigante iliajn interŝanĝojn, precipe tion kion la socio konstruas por centri la ekonomian aktivaĵon kaj la politikan agadon cele al la bezonoj de la homa estulo kaj la respekto al la naturo, nun kaj por estontaj generacioj.




13. La Monda Socia Forumo, kiel kunordigejo, serĉas plifortigi kaj krei novajn naciajn kaj internaciajn kunordigojn inter instancoj kaj movadoj de la civila socio kiuj kreskigas, en sfero, tiel de publika, kiel de privata vivo, la kapablon de neperforta socia rezistado al la procezo de malhumaniĝo, kiun mondo spertas kaj al perforto uzata de la ŝtato, kaj krome fortigas la humanigajn iniciatojn, nun kreatajn per la agado de tiuj movadoj kaj instancoj.

14. La Monda Socia Forumo estas procezo stimulanta ĝiajn partoprenantajn instancojn kaj movadojn situigi siajn lokajn aŭ naciajn agadojn, kune kun la internaciaj instancoj, kiel demandojn de planeda civitaneco, enkondukante en la mondan agendon la transformigajn praktikojn kiujn ili aplikas en la konstruado de nova pli solidara mondo.



**Aprobita kaj subskribita en San-Paŭlo, la 9an de Aprilo 2001, de la instancoj konsistigantaj la organizkomitaton de la Monda Socia Forumo, aprobita kun modifoj de la Internacia Konsilio de la Monda Socia Forumo la 10an de Junio 2001.**

Priskribo de [Mondaj Sociaj Forumoj]

# Esperanta Skrablo

*La retejo skrablo.ikso.net proponas Esperantan version de la fama ludo Skrablo (Scrabble, en la angla). Tie eblas ludi sola kontraŭ komputilo aŭ kontraŭ aliaj membroj, ekde du ĝis kvar.*




*Ekzemplo de ludo kun iom… malkutimaj vortoj !*

En ĉi tiu komputile adaptita versio, vi rajtas ludi ĉiun ajn vorton (aŭ nur radiko), tiom longe ke la kontraŭludantoj ne malakceptas ĝin. Tiam vi simple klarigu vian vorton kaj reludu ĝin (aŭ iun alian).


Oni rapide vidas ke ekzistas du kategorioj da ludantoj : la seriozaj kaj la malseriozaj. Kompreneble tiu ĉi ludo estis ne tro serioza, kvankam «Manfilmterenoj» probable temas pri terenoj kie oni filmas manfaritajn filmojn. Mi iomete dubas ke vi uzos tiun vorton en la vera vivo, sed kial ne ?

Skrablo en esperanto multe malsamas al tiu en la aliaj lingvoj, pro la sistemo de afiksoj kaj radikoj. Pli facilas ol neniam arigi radikojn por krei novajn vortojn. Estas okazo por malkovri nekutimajn, strangajn, foje poeziajn vortojn kiel «fratigi», «ĥoramo», «timkora», kaj tiel plu.

Samy

| Litero | valoro | nombro |
|---|---|---|
| A | 1 | 8 |
| B | 4 | 2 |
| C | 4 | 2 |
| Ĉ | 4 | 2 |
| D | 2 | 3 |
| E | 1 | 8 |
| F | 3 | 2 |
| G | 3 | 2 |
| Ĝ | 3 | 2 |
| H | 8 | 1 |
| Ĥ | 10 | 1 |
| I | 1 | 8 |
| J | 2 | 3 |
| Ĵ | 10 | 1 |
| K | 2 | 4 |
| L | 1 | 4 |
| M | 2 | 4 |
| N | 1 | 6 |
| O | 1 | 8 |
| P | 2 | 3 |
| R | 1 | 6 |
| S | 1 | 6 |
| Ŝ | 4 | 1 |
| T | 1 | 4 |
| U | 1 | 4 |
| Ŭ | 8 | 1 |
| V | 3 | 2 |
| Z | 5 | 1 |

Distribucio kaj valoro de la literoj




www.horizonto.net

# Vojaĝo per bicikIo tra la mondo de Cirilo kaj Roz’






## Francio

▷ Klik, klik, aŭdeblas la ĵurnalistaj fotiloj de la tri regionaj ĵurnaloj, samtempe ol la aplaŭdoj de niaj familianoj kaj amikoj vinintaj por vidi nian ekbiicikladon elde Narbono lundon la 16-an de marto 2009.

Ni ne jam scias, ke temas pri la unuaj klikadoj el granda serio.

Ni feliĉas pro la ekiro. La semajnoj antaŭ nia foriro lacigis nin. Ni ne ĝuis unu ripozminuton. Ni nenion forgesu. Ni elvakciniĝu, ĉar iuj estas devigaj en kelkaj landoj. Ni ordigu la apartamenton kaj solvu ĉiujn administrativajn problemojn. Fine, ni vizitigu la Aldean regionon al la Cirilaj familianoj, kiuj venis por la evento, dum la Rozaj loĝas surloke.

Ek, ni foriras. Jen la unuaj pedaladoj al nova estonteco, al valoraj renkontoj, en unu vorto al nova vivo.



La unua etapo mallongas. 40 km ĝis Béziers, kie akceptas nin juna instruistino.

Post Montpellier, ni trabiciklas Kamargon, sovaĝan regionon en la Rodana delto, plenan je marĉoj, lagoj kaj riveretoj. Temas pri paradizo por sovaĝaj bestoj sed eble ne por homoj, ĉar, je nia plej granda surprizo, trinkebla akvo daŭre ne troveblas ĉie. Cirilo fakte logos la naturan scivolemon de policistoj kiam li pumpos akvon el fontano per nia akvopurigilo.



La unuan fojon ni vidas flugantajn flamingojn.

Aliflanke, ne interesas nin la flugado de kuloj kiam ni post la sunsubiĝo starigas bian tendon meze de kanoj.

▷

▷ La vento pli kaj pli forte blovas kaj ni malfacile antaŭeniras. Akceptas nin familio kies 13-jara filo estas lerta manlaboranto; lia patro diras, ke li fabrikas kabanoj, sed tre impresas nin la vizito de tiu konstruita por la fratino, kvazaŭ temas pri dometo.
Li ankaŭ donis la formon de vojaĝmotorciklo al eta biciklo. Li eĉ muntis muzikaparaton sur alia biciklo kaj provizas ĝin per elektro dank' al dinamo. Por aŭskulti muzikon, sufiĉas nur ne haltigi la pedaladon.
Post plia tago ni atingas al Miramas. Tie, Roz' retrovas malnovan amikinon kies 8-jara filino demandas «en kiom da tempo ni realigos nian mondan trairadon 80 tago ?» De ĉiuj la demandoj pri nia vojaĝo, sendube temas pri la plej malfacila.



Post la grandaj etendaĵoj Kamargajn, jen montaro. Ni pli kaj pli proksimiĝas de la interkruutejo Verdon, la klimato draste ŝanĝiĝas. Je iu matena vekiĝo, surprizas nin nia tute blanka tendo. Nokte frostis !


Ni pli kaj pli malrapidas. Deklivoj sekvas deklivojn. Ni bezonas unu horon por bicikli 4 km. Suprendeklivoj kompreneble malrapidigas nin sed ankaŭ la vento forte enŝoviĝanta en la interkrutejo. Sed ja la pejzaĝo estas nia plej granda malrapidigilo. Ĝi tiom belas ke ni senĉese haltadas por foti!

Ni ne konsciis ke hodiaŭ estas dimanĉo posttagmeze. Kiam ni alvenas en La Palud, ĉio estas fermita. Fakte, "ĉio" signifas la solaj panejo kaj nutraĵvendejo... Restas al ni preskaŭ nenio por manĝi... Dum Roz' lavas siajn vestaĵojn en publika lavejo, Cirilo serĉas telefonbudon. Li revenas kun pano, pastaĵojn kaj kokidaĵo. Li babilis kun biciklema aŭtanto ferianta en la regiono. Ni povos nutri nin ĉi-vespere...

Ni eniras sur cirklan vojeton laŭ le rivero Verdon kaj trovas fermitan rifuĝejon. Tibetaj preĝtukoj flirtas en la vento, ni aldonas niajn vestaĵojn por sekigi ilin.

La kovrita teraso ŝirmos nian tendon kaj protektos nin kontraŭ la vento, kiu kirle blovos la tutan nokton.

Lunde Roz' malantaŭen revenas al La Palud cele aĉeti nutraĵojn, dum Cirilo plubiciklas sur la cirkla vojo tra suprejoj daŭrre neĝkovritaj.



Ĉio ĉi elĉerpis nin. Ni decidas mallongigi la itineron kaj ni direktiĝas al Saint-Raphaël, kie esperantistaj amikoj atendas nin por unu-semajna ripozo.

La varma akvo de duŝo anstataŭos la glacian akvon de fontoj , la lavmaŝo la publikajn lavejojn, komforta lito niajn ŝvzlzblajn *(NdlR: en la franca, «auto-gonflants»)* matracojn!

*(sekvenda)*

# Revenante el la infektita fermit-areo de Fukuŝimo (urbo Futabo)

Bonan tagon al ĉiuj.

Mi hodiaŭ revenis el Tokio.
Tiu vizito de Futabo kaj mia renkonto kun diversaj membroj de la familio kiu alkondukis min tie, estis emociantaj.
Mi kredis esti forta, mi konstraŭstaris la skuon kiam mi kunestis kun ili, sed ĉi-vespere, kiam mi rehejmiĝis,mi ekploris...






Bildoj de disfalitaj domoj, de ruinigita ŝoseo, de la malsupra urbo ĉe marbordo tute malaperita (nur restas kvazaŭ forlasita tereno senfina),
bovaj ostoj en la bovejo (la uloj intencis rehejmiĝi sekvontan tagon kaj ne imagis ke forlaso estus senrevena, ili lasis la bovojn enŝlositajn en la bovejo),
duono da dentaro de bovo en la survoja ŝlimo (plejeble formanĝita de malsataj vagaj hundoj),
ventro ŝvelita de kroma bovo putrita kiu venis morti ĉe kroma vojo,
montrvitroj de detruitaj vendejoj, iliaj varoj forlasitaj, senorde,
etaj tradiciaj kultejoj tute misaj,
monumentoj en la tombejo parte kuŝigitaj,



senuzaj kurtenoj elirante el rompitaj fenestroj, kiuj svingiĝas laŭ la malvarma vento de februaro,
kaj ankaŭ ĉiuj tiuj belaj starantaj domoj, ĵuskonstruitaj, ĉirkaŭitaj de ĝardenoj, en kiujn ne eblas reveni por vivi, ĉar ili estis radioaktive infektitaj...

Miaj amikoj, provante repreni kelkajn posedaĵojn, kiujn ili devas verifikigi, por aserti ĉu tiuj estas sufiĉe ne tro radioaktivaj por rajti eliri la areon...



Ili ekipiĝis kun verifikilo, kiun ili prunteprenis ie por denove verifiki... Plejofte, vestaĵoj estas tro infektataj por rajti esti forprenitaj.

Tiuj homoj, pudoraj pri iliaj malfeliĉo, sed ne plu ridetantaj, kiuj havis plej belan vivadon ĉi-tie, inter arbaro, montaro kaj marego, hodiaŭ elmigrintaj en fabrikitajn malgrandajn loĝejojn... Ili posedis bovojn, domojn, bienojn, rizejoj...
Pudoraj, ĝis kiam ili liberiĝos baldaŭ, unuitaj ĉe tagmanĝa tablo de restoracio en najbara urbo, ili konfesos:
« Mi neniam imagintus iĝi tiel malriĉa. »
« Mi tiom dezirintus helpi tiujn de la malsupra urbo, kies domoj estis englutitaj de la cunamo, loĝigi ilin, sed ne eblis: nia

domo estas infektata, endas ne plu loĝi en ĝi. »



« Post monatoj en mezlernejo ne plu uzita, dividante kursĉambron kun ceteraj elmigritpoj, ni sukcesis trovi etan loĝejon, sed ni ankoraŭ ne havas laboron », poste « Ni estas malproksime al la maro, tio mankas al ni, ni ĉiam vivis ĉi-tie. »

« Ankoraŭ restas 12 jarojn pagotajn por domo, kiu iĝis neloĝebla... La ioman da mono, kion ni ricevas, ni devas konservi, por elpagi la ŝuldon... Ne plu restas ion al ni. »



(Tio estas komuna problemo en Japanio: oni plu pagas suldojn, malgraŭ io ajn evento, eĉ por domo disfalita aŭ malsanfavora, sekve de katastrofo).

« *Mia domo estas tiu flava, kun granda fenestrego kontraŭ la maro, kiun vi ĵus vidis. Ĝi belas, ĉu ne? Ĝi estas ege infektita, nenio plu utilas.* »
Kutime, post natura katastrofo, homoj interhelpiĝas, purigas, kune rekonstruas kaj vivo rekomenciĝas...

... Sed nuklea katastrofo estas ne normala katastrofo.



Nur restas ruinaĵoj, malplenaj domoj kaj senanimaj urboj, kaj ne utilas fari ion, ripari ion: nek vojojn, nek tegmentojn, nek murojn, nek tombejojn, nek bovejojn...
Ne plu lokiĝeblas homoj, ilia laboro, iliaj brutoj aŭ bienoj.
Kvazaŭ homo estus troe.

Iu kiu iĝis sen io ajn, kies profesia vivo ĉiam okupiĝis pri atomcentraloj, fine konfesis al mi:

« Necesus alia formo de energio… ».

ATOMENERGIO? NE DANKON



Janick Magne,
Kandidatino de franca partio EELV por deputita elektado en Azio-Oceanio-CEI

2012, Februaro 19

Origina ligilo (france): http://janickmagne.fr/2012/02/de-retour-de-la-zone-interdite-de-fukushima-ville-de-futaba/

# Por homoj de ĉiuj aĝoj: «Revoj kaj Sonĝoj», La 11a Novjara Renkontiĝo en Xanten

Entute 161 homoj el 14 landoj ĉeestis en la 11a Novjara Renkontiĝo, kiu okazis de la 27a de decembro 2012 ĝis la ĉi-jara 3a de januaro, apud la germana urbo Xanten (okcidente de la Ruhr-regiono).
En la unua jardeko de sia ekzisto la Novjara Renkontiĝo (NR) sukcese akiris la famon esti *la* vintra renkontiĝo por Esperanto-familioj – kun riĉa infana programo por la diversaj aĝogrupoj. Ankaŭ ĉi-jare la gaja infanaro el sep landoj, ĉ. 40-kapa, plene ĝuis la riĉan oferton – ĉefe manlaboroj, ludoj kaj kantoj, grandparte kadre de la renkontiĝa temo“revoj kaj sonĝoj”.
Intertempe multaj el la iamaj infanoj fariĝis junuloj kaj nun gaja grupo de dudeko da junuloj inter 12 kaj 20 jaroj denove formis belan kunularon kaj bone amuziĝis dum la jarfina semajno.

Pli kaj pli la Novjara Internacia Semajno por junuloj, kadre de NR, allogas kunfestantojn.
En NR dum la jaroj kreskis ankaŭ la prelega programo, kun trideko da diversaj ofertoj, kiu allogas homojn de ĉiu aĝo. Ĉi-foje eblis interalie sekvi prezentojn pri ekstersunsistemaj planedoj, modernaj hejtsistemoj, subkonscia rasismo, financa krizo, amo, Japanio, la venonta Azia Kongreso en Israelo, Ruando (dudek jarojn poste), la projekto Mazingira, Vikipedio kaj libera scio, fotado, ludoj, maŝintradukado, nederlanda biciklo-kulturo, dormado, kondutdependeco, alttalentuloj, persona evoluo, la lingvoprojekto Lidepla kaj budaismaj meditado kaj filozofio. Oni povis partopreni krome en tradukateliero, filmoateliero (kaj spekti aliajn filmojn), en teatra kurso, diversaj masaĝorondoj, trikado, harplektado, ĵonglado, Mahjong-kurso, senstreĉiga gimnastiko, jogo, teatrosporto kaj svingodancado. Aŭ simple iom revadi en la revosalono belege ornamita de Christoph Frank. Kaj kompreneble ni traktis ankaŭ Esperanton mem – temis pri la Esperanto-centroj, nia estonteco (“Kien ni iras?”), Esperanto en politiko kaj la aktualeco de fina venko.
Malfacilis enui dum NR…





Pri Esperanto-lernantoj zorgis Mazi-prezentado kaj pliaj kursoj por komencantoj, progresantoj kaj konversacio. Instruemuloj povis sekvi enkondukon en la Cseh-metodon.







En la arta programo ni havis plurajn koncertojn – de jOmO, Tone el Brazilo kaj de la Tuluza fabelrakontistino kaj kantistino Vjera – ĉiuj tri entuziasmigis sian publikon. Vjera prezentis ankaŭ fabelojn kaj laŭtlegis ĉapitrojn el *La eta princo*. Christoph Frank prezentis la (pup-)teatraĵon *La sonĝofranduleto*. Kantigis la partoprenantojn en pluraj rondoj Saskia Idzerda kaj Jesper Jacobsen. Kaj en la adiaŭa vespero partoprenantoj impresis per sia arto kaj lerto.
Iom ni ankaŭ forlasis la ejon – por diversaj promenoj, laŭ la apuda lago kaj al la urbocentro de Xanten, kaj ankaŭ al la Arkeologia Parko de Xanten, kie prezentiĝas la romia historio de la urbo. La skoltema junularo kompreneble ankaŭ iom eksterumis.
La internacia renkontiĝo de pli ol cento da homoj kompreneble allogis ankaŭ la gazetojn de la regiono, radion kaj televidon, kiuj ĉiuj afable raportis pri ni.
Venontjarfine Novjara Renkontiĝo kun la Novjara Internacia Semajno por junuloj plej verŝajne okazos en Saarbrücken, germana urbo apud la franca landlimo. Do: Bona bazo por la internacia Esperanto-renkontiĝo.





Antaŭĝojas bonvenigi ankaŭ vin la organizantoj Nicky, Betti, Christoph kaj Lu Wunsch-Rolshoven.

*EsperantoLand Papere.*
*La Ondo de Esperanto, 2013, №2.*
*Rete: La Balta Ondo*
http://sezonoj.ru/2013/01/220nr/

LA ONDO de Esperanto
Internacia sendependa magazino en Esperanto

La Balta Ondo
BALTA ESPERANTO-FORUMO EN LA RETO

EsperantoLand.org

# Skandalo en Eŭropa Unio pro ĉevalo-viando

Jam en pasinta ĵaŭdo skribis la eŭropaj gazetoj pri la malkovrita trompo, kiu okazis en Britio. En iun frostigitan pastaĵon (lazanjo Findus) oni enmiksis viandon de ĉevalo, dum laŭ la etikedo la produktaĵo enhavas nur bovaĵon.




Dumtempe evidentiĝis, ke oni liveris ankaŭ al Francio el tiu ĉi produktaĵo. Iu franca firmao asertas, ke la ĉevalo-viando devenas el Rumanio, sed tion dementas la rumanaj instancoj. Laŭ Daniel Constantin rumana ministro pri agrikulturo, ne troviĝas tia suspekto, ke en Rumanio estus okazinta erara etikedado de la viandoj kaj ke la ĉevalo-viando estus vendinta de la tuŝitaj rumanaj buĉejoj, kiel bovaĵo.

Li aldonis: En Rumanio ĉiuj permesitaj buĉejoj obeas la regulojn de Eŭropa Unio. La konsumado de ĉevalo-viando povas esti danĝera nur tiam, se la besto antaŭ la buĉo ricevis medikamentojn, -ekzemple antibiotikojn aŭ medikamenton kontraŭ inflamo-, kaj la necesa kaj deviga tempo ankoraŭ ne pasis.







En la buĉejoj, kiuj havas permesilon, la ekzamenoj antaŭ la buĉo kaj la dokumentoj, kiuj akompanas la bestojn garantias, ke tio ne povu okazi.
Tamen jam pri la uniaj aranĝoj konsultas la ministroj de la tuŝitaj landoj. La ministroj volas pritrakti kun Eŭropa Unio tiujn aranĝojn, kiuj estas bezonataj por la ampleksa trakto de la afero. – komunikis Irlando, kiu nun plenumas prezidantajn taskojn de Eŭropa Unio.



La franca ministro pri agrikulturo Stéphane Le Foll, jam lunde anoncis, ke li interkonsentis kun sia brita kolego, ke ili aranĝas ankoraŭ ĉisemajne eŭropnivelan kunvenon pri la afero. La ministro aldonis, ke Francio proponos la plibonigon de etikedado de nutraĵproduktaĵoj en Eŭropa Unio. Le Foll emfazis ankaŭ tion, ke Francio tuj fortigas la kontrolon de viando- kaj fiŝo-komercaj retoj.
La irlanda ministro Simon Coveney rapide kunvokis la merkredan kunsidon en Bruselo, kion partoprenos interalie Tonio Borg, -kiu estas komisionano responsa pri sanprovizo kaj defendo de konsumantoj-, kaj memkompreneble la ministroj eŭropaj, kies landoj estas tuŝitaj en la demando.
Tamen la proparolanto de Tonio Borg alvokis la atenton, ke Eŭropa Unio havas rajton malpermesi la vendadon de kiu ajn produktaĵo nur tiam, se tio signifas realan danĝeron por la sano. En alia okazo, la afero apartenas al la membroŝtatoj kaj ili devas kontroli kaj ekzameni la kvaliton de tio.

Eŭropa Civitano

# Litova Esperanto-Asocio invitas vin partopreni vicajn ĉiujarajn internaciajn somerajn tradiciajn la 49-ajn Baltajn Esperanto-Tagojn (BET- 49)

**CELOJ kaj TASKOJ**: studi problemojn de Esperanto-movado, elstarigi nuntempajn ĉefajn taskojn de Esperanto-agado, interŝanghi sperton pri esperantista laboro, perfektiĝi en Esperanto, enhavoriĉe pasigi la tempon. BET okazas ekde 1959 ĉiujare laŭvice en Latvio, Estonio, Litovio.




**LOKO**: BET-49 okazos en orientlitovia urbo regiona centro UTENA, kiu estas fondita en 1261 kaj estas unu el la plej malnovaj loĝlokoj de Litovio. En la urbo loĝas 35000 loĝantoj . Ĝi okupas 1510 hektarojn de areo, tra la urbo fluas kvar riveroj, estas du belegaj lagoj. La urbon de ĉiuj flankoj ĉirkaŭas lagoj, arbaroj kaj montetoj... En la teritorio de distrikto UTENA kaj proksime estas 186 lagoj kaj lagetoj , inter ili, la plej profunda ( TAURAGNAS ) , la plej longa ( AISETAS ) kaj la plej ŝatata ( ALAUŠAS ) en Litovio. Blazono de urbo UTENA estas orkolora hufumo - simbolo de feliĉo. BET-49 funkcios en moderne kaj bonege ekipita Kolegio de UTENA ( pl. Utenio 2, 4 ), kie estas luksaj kondiĉoj por laboro de BET-49. Partoprenantoj de BET-49 libere povos uzi ĉiujn ejojn kaj servojn de la Kolegio (salonoj, auditorioj, la plej modernaj teknikajhoj, muzikiloj, multaj komputiloj kun libera reta aliro, videoekipaĵoj por internaciaj forestaj konferencoj k.s.).

UTENA estas facile atingebla buse kaj automobile. BET-49 ĝuos ĉiuspecan helpon kaj kunlaboron de urba gvidantaro. Retejo de la urba kaj distrikta municipo estas www.utena.lt ( en litova kaj angla lingvoj ), retejo de turisma informa centro de UTENA estas www.utenainfo.lt ( en litova, rusa kaj angla lingvoj ), retejo de Kolegio de UTENA estas www.utenos-kolegija.lt ( en litova kaj angla lingvoj ).

**TEMPO**: BET-49 funkcios la 6-an – 14-an de Julio , 2013. Veni al la aranĝo eblas jam la 5an de Julio.

**PARTOPRENO**: ni invitas ĉiujn esperantistojn. Speciale ni dezirus vidi esperantistojn el la landoj ĉirkau Balta maro, sed ankau de ĉiuj aliaj najbaraj kaj pli foraj landoj. La kvanto de partoprenantoj ne estas limigita.

**ANTAŬ KAJ POST BET-49** estas ebleco laŭ moderaj prezoj aktive ripozi en proksime de UTENA funkciantaj vilaĝaj altkvalitaj turismejoj kaj ripozejoj. Interesiĝantoj pri tio bonvolu aparte peti informojn ĉe Organiza komitato.

**ALIĜO**: BV skribi al litova.ea@mail.lt



Povilas JEGOROVAS
Prezidanto de Litova Esperanto-Asocio

# La 29-a INTERNACIA FESTIVALO EN DORTMUND



**27.12.2012 - 3.1.2013**
**Kadra temo: komputilo / interreto**



Ĉi-jarfine Dortmund gastigis la 29-an IF-on en la junulara gastejo, kiu troviĝas en la centro de la urbo. La eventon bone organizas Hans-Dieter Platz, konata sub la mallongigo HDP.
Partoprenis ĝin 80 geesperantistoj el 15 landoj. La plej foraj partoprenantoj venis el Israelo, Japanio kaj Kanado.
La programo, kiel kutime estis varia kaj enhavis multajn diskutajn,, klerigajn kaj distrajn erojn tial ĉiu povis libervole elekti sian preferatan programeron.

Dumtage okazis interesaj prezentoj dediĉitaj ne nur al la kadra temo, sed ankaŭ aliaj temoj estis pritraktataj dum prelegoj, seminarietoj, diskutrondoj...
Ne mankis libroservo kun vasta oferto de diversaj libroj kaj aliaj esperantaĵoj.
La kadra temo estis priparolata en pluraj prelegoj. Krome okazis aliaj interesaj programeroj: matena gimnastikado, muzikaj atelieroj, aŭtoraj horoj, prilaborado de steatito (sapŝtono) kaj juvel-farado, mantro, dancado, muzik-improviza ateliero.
Allogis prelego pri kuracaj plantoj fare de Harald Schicke.
Pri spertoj de la vintra subĉiela naĝado rakontis Kristin Tytgat.



Pri gaŭlo-romiaj diinoj prelegis Wilfried Schumacher.
Anna Striganova kaj Dima Schevĉenko el Rusio enkondukis nin al la mirakla mondo de fabeloj dokumentita per belaj pupetoj memfaritaj de Anna.

Jam la sesan fojon okazis la Internacia Vintra Universitato (IVU), kiun sukcese partoprenis rekorda nombro da ekzamenatoj. Ili ĉiuj ricevis la respektivajn AIS-atestojn.

Tre sukcesa kaj aprezata estis la prelego de Hannes Larsson pri violono.



Wandel interese kaj entuziasme rakontis pri aventuroj dum sia vojaĝo tra Laoso kaj Birmo. Harald Schicke rememorigis Universalan Kongreson en Hanojo per serio da bildoj, kiujn poste ankoraŭ kompletigis Rémy Bouchet.
Dum la israela vespero Amri omaĝis al la tre aprezata amiko Josef Ŝemer, kiu bedaŭrinde forpasis printempe kaj kiun multaj el ni konis.



En la dua parto de la vespero Gila (la edzino de Amri) prezentis belan ventro-dancon.

Poste la paro montris bildojn pri la pasintjara Israela Kongreso kaj invitis partoprenantojn al la 7-a Azia Kongreso, kiu okazos en Jerusalemo aprile 2013.
Sekvis bilda prezentado de turismaj lokoj, kiujn oni vizitos dum tiu kongreso, kaj komuna popoldancado.

Vesperajn programerojn plenumis la partoprenantoj.
Okazis interkona kaj internacia vesperoj, koncerto de Mikaelo Bronŝtejn kaj Sergeo Straŝnenko,



kvizo, dancvespero en la ritmo de rokenrolo.





Dum la bierseminario Harald Schicke rakontis pri fabrikado de biero, ĝiaj sanigaj efikoj kaj ni gustumis ok lokajn bierojn. Dum ĝi, ekestis tre agrabla babilado.

Dufoje oni promenis tra la urbo kaj kelkaj el ni vizitis ankaŭ DASA-ekspozicion. Dum la tuttaga ekskurso ni malkovris la Ruhr-regionon, en kiu Dortmund troviĝas.
En la urbo Bochum ni vizitis planetarion, kie Amri Wandel klarigis pri kelkaj bildoj de



la astronomia ekspozicio, kaj la sekvan tagon li en sia prelego kompletigis niajn sciojn kaj montris la planetarian ĉielon. Poste ni veturis al la urbo Essen, kie ni vizitis eksan minejon kaj koaksigejon. Tie ni ricevis interesajn informojn pri ĝia pasinteco. Ni bonguste tagmanĝis en tiu nekutima loko.
Ĉiam tre frekventata dum la paŭzoj kaj ĉefe post la vesperaj programeroj ĝis malfruaj horoj estas la ŝatata knajpo. Tie oni ricevas variaĵojn de bieroj, vinoj, kokteloj, teoj kaj aliaj trinkaĵoj kaj almanĝaĵoj. Ĉi-foje la knajpon estris Harald Schicke kaj Johanna Platz (la edzino de HDP) kun helpo de Anna kaj Dima. Akordiona muziko ĉiam kreas belan etoson akompanante kantadon.



La Silvestra bufedo estas ĉiam riĉa kaj bele prezentita.



La balo kiel kutime komenciĝis per la polonezo.
Ni ĝoje tostante bonvenigis kelkajn novjarojn (laŭ la loĝhorzonoj de la partoprenantoj).
Poste ni dancis kaj bone amuziĝis ĝis frumatenaj horoj.

Dum la internacia vespero la partoprenantoj montris siajn talentojn.
Ni aŭskultis kantojn, muzikon, ĝuis skeĉojn.
Per kantoj de barbuloj oni finis tiun lastan vesperon.
Estis anoncite, ke la Internacia Festivalo sub la gvido de Hans-Dieter-Platz (HDP) ne plu okazos post la 30-a jubileo.
Do, se vi deziras ĝui neforgeseblan internacian semajnon, pasigi agrablajn jarfinajn tagojn kaj festi la jubileon en amika kaj gaja etoso, venu al la 30-a Internacia Festivalo, kiu denove okazos en Nordlingen.
Ni esperu, ke tiu bela kaj neforgesebla tradicio de IF-oj daŭros en la estonteco.





*Liba Gabalda*

# La 29a INTERNACIA FESTIVALO

## DORTMUND 2012/2013



Fotis kaj aranĝis Liba kaj Floreal Gabalda

FESTO 2013 EN BELGIO !

# MUZIK-FESTIVALO ESPERANTO





# FESTO

2013

## Reveno al Amikejo

De la 10a ĝis la 18a de Aŭgusto

EN KELMISO

INTER NEDERLANDO, GERMANIO, ...

KAJ BELGIO !

festo.jefo.fr

**La muzik-festivalo okazos ĉi-jare en AMIKEJO !**

En tiun teritorion historian, proklamita neŭtrala (Neŭtrala Moresneto), dum pli ol unu jarcento, venos artistoj el la tuta mondo por kanti laŭ diversaj muzikoj : folka, popa, roka, metala, repa... en Esperanto. Dum FESTO, variaj atelieroj estos proponitaj : Esperanta kurso por komencantoj, muziko, pentrado, ĵonglado, ktp ...

EDITEUR RESPONSABLE : LAURENT LOISSE AKTUALA@ESPERANTOBRUSELO.ORG